

**I. Lingvokonaj taskoj**

**Maksimumo de akireblaj poentoj: 20**

**Solvu la subajn taskojn!**  
**Proponita labortempo: 60 minutoj**

---

**1. Aldonu la mankantajn prepoziciojn!**

Aŭtune kaj printempe, \_\_\_\_\_ (1) la grandaj migradoj \_\_\_\_\_ (2) bestoj kaj birdoj, la marĉego transformiĝis \_\_\_\_\_ (3) grandan manĝejon. Centmiloj \_\_\_\_\_ (4) kolomboj, anasoj, anseroj, agloj kaj aliaj birdoj haltis tie \_\_\_\_\_ (5) manĝi. Poste ili migris norden aŭ suden.

**2. Aldonu la sufiksojn!**

La akvo de la rivero kutime malpli \_\_\_as (1) ĉiusomere pro manko de pluvo. En la rivero estas bakterioj, ĉar oni ne sufiĉe bone pur \_\_\_as (2) la akvon. Feliĉe la malpur \_\_\_o (3) de la akvo ne ĉiujare postulas, ke oni fermu la naĝ \_\_\_on (4). Tamen se vi deziras naĝi, prefer \_\_\_e (5) venu komence de la somero.

### 3. Kiuj konjunkcioj mankas en la teksto?

Elektu la ĝustajn el la suba listo; atentu, estas du superflujaj!

#### Libereco de tradukanto

Estus grava eraro starigi ian normon, \_\_\_\_\_ (1) oni devas traduki. La tradukisto bezonas certan kreaĵliberecon, \_\_\_\_\_ (2) tamen ne rajtas kaŝiĝi malseriozeco, neglektemo, fuŝemo aŭ suprajemo. Ĉiu originalo ebligas plurajn interpretojn en alia lingvo, \_\_\_\_\_ (3) – malgraŭ siaj diferencoj – povas esti ĝustaj kaj pravigeblaj. La tradukanto sciuj kaj konsciuj, \_\_\_\_\_ (4) ebloj de tradukado ekzistas, \_\_\_\_\_ (5) diversaj manieroj eblas traduki konkretan tekston aŭ teksteron.

**kiaj - kio - kiuj ĉiuj - laŭ kiu - malantaŭ kiu - per iu - per kiaj**

### 4. El la verboj formu participojn kaj enskribu ilin en la ĝusta formo!

Kompare kun la altaj montoj la skicentroj aspektas kiel nanoj, kiel alumetskatoloj. Feliĉe ili estas (farbi) \_\_\_\_\_ (1) ne-  
okulfrape.

Infanoj – tre (malpliigi) \_\_\_\_\_ (2) nuntempe ĉi tie – ludas kutime ekstere, sed la forte (blovi) \_\_\_\_\_ (3) freŝa vento ofte revenigas ilin en la etan kuirejo-vivĉambbron.

La vojo al tiuspeca vilaĝeto serpentumas sur la monto, (serĉi) \_\_\_\_\_ (4) aliron.

La ŝoseo danĝeras pro subitaj ĝirejoj kaj abismorandoj.

Tial la (permesi) \_\_\_\_\_ (5) aŭto-rapido estas nur 30 km hore.

### 5. Elektu la ĝustan vorton por kompletigi la frazojn!

1. Pro malkonsento ili ... .

- A) eksedziĝis      B) reedziĝis      C) eledziĝis      D) geedziniĝis

2. La registrita letero alvenos ... aerpoŝto.  
A) pli rapida ol  
B) pli rapide ke  
C) plej rapide per  
D) pli rapide ol
3. La patro opinias sian filon jam ... .  
A) plenkreskulon  
B) plenkreskite  
C) plenkreskulitan  
D) plenkreskulo
4. La kristanoj ... solenas Kristnaskon.  
A) la 25-an de decembro  
B) per 25-an de decembro  
C) sub 25-a de decembro  
D) en 25-an de decembro
5. La vetero estas malvarma, ... do vian mantelon!  
A) butoniĝu  
B) butonigu  
C) malbutonumu  
D) butonu
6. Tri ... post la komenco de la laboro mi jam enuis.  
A) semajno  
B) semajnon  
C) semajnoj  
D) semajnojn
7. Mia patrino kuraĝigas min jene: "Lerni ... !"  
A) bezono  
B) estas bezonate  
C) estas bezona  
D) bezonata
8. La soldatoj pro la peza batalo ... povas marŝadi.  
A) kvazaŭ  
B) apenaŭ  
C) preskaŭ  
D) almenaŭ
9. La bestgardisto lasis la gregejon ... .  
A) malfermita  
B) malfermanta  
C) malfermon  
D) malferminte
10. La kanonon oni nomas ankaŭ pafil ... .  
A) ero  
B) o  
C) ego  
D) ilo
11. Ladislao solvis la taskon sen ... .  
A) nenio helpo  
B) ies helpo  
C) neni helpis  
D) ke neni helpu
12. La morgaŭa vetero ŝajnas .... , kvankam minacas kelkaj nuboj.  
A) esti agrable  
B) agrable

C) agrablo

D) agraba

13. Vespere .... la horizonto ... la suno.  
A) sur ... pasis  
B) ĉe ... malaperis  
C) aperis ... sur  
D) sub ... ekiris
14. La patron ... patro oni nomas avo.  
A) sia  
B) ties  
C) al tiu  
D) de ies
15. Mi hontas ...  
A) min pro tiu ago  
B) al mi tiun agon  
C) pri tiu ago  
D) tion agon
16. La sankta libro de islam... estas Korano.  
A) antoj  
B) istoj  
C) uloj  
D) anoj
17. La ŝoforo foriris ... benzinon, sed li baldaŭ revenos.  
A) ke aĉeti  
B) por aĉetu  
C) ke aĉetas  
D) por aĉeti
18. Antaŭ grandaj festoj la kvanto de vojaĝantoj ...  
A) multobliĝas  
B) multobladas  
C) multobligas  
D) multigas
19. Mi donas al vi kuracilon, se doloras ... reŭmatismo.  
A) al vi  
B) vin  
C) vi pro  
D) de vi
20. La geavoj estas kontentaj ... la rezultoj de siaj nepoj.  
A) sur  
B) por  
C) pri  
D) kun

## II. Komentariado

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

**Legu la suban tekston kaj prezentu vian opinion pri la temo, pritraktante ĉiujn partojn de la problemo!**

**Amplekso de la komentario: 20-25 linioj**

**Proponita labortempo: 60 minutoj**

---

Kion oni komprenas el la legaĵoj?

Lastatempe pluraj pritaksadoj estis faritaj ĉie en Eŭropo pri la legkapablo de la lernejoj.

Tiuj mezuradoj plejparte montras, ke la lernantoj ne tre bone komprenas la legatajn tekstojn. Ankaŭ tio evidentiĝis, ke la lernejoj ne spegulas la kvaliton de la cerbumado, la evoluintecon de la ĝeneralaj kapabloj, la kapablon praktike uzi la akiritajn konojn. Krome, ekzemple en Hungario, estas granda diferenco ĉi-terene inter la lernantoj de diversaj lernejoj.

### III. Skriba sinesprimo

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

**Elektu unu el la subaj du temoj kaj skribu laŭ ĝi 20-25-linian leteron! Via letero traktu ĉiun proponitan eron, sed ĝi ne superu la postulatan amplekson; atentu pri la kohereco de via teksto! Ne forgesu la formalizaĵojn de la letero (alparolo, saluto, dato, subskribo)!**

**Proponita labortempo: 60 minutoj**

---

#### I.

Vi skribas leteron al via korespondamiko, en kiu vi traktas la jenajn demandojn:

- Kion vi pensas/faras kiam vi vidas almozulajn/senhejmulojn surstrate?
- Kial altas ilia nombro en la nuna socio?
- Kion povas fari la ŝtato, individuoj por helpi ilin?
- Kion ili povus/ devus fari mem por plibonigi sian sorton?
- Kion vi farus, se subite vi komplete bankrotus kaj trovus vin surstrate?

#### AŬ:

#### II.

Skribu leteron al vi amik(in)o, en kiu vi

- mencias, ke oni povas akiri filmojn tra la interreto
- prezentas vian opinion pri tiuj hejmaj kinejoj
- skribas pri tio, kigrade ili influas la libertempajn kutimojn
- mencias kelkajn malavantaĝajn efikojn
- resumas vian opinion pri la socia rolo de la interreto.

## IV. Lega kompreno

Maksimumo de akireblaj poentoj: 20

### IV/A

**Legu la suban tekston kaj solvu la taskojn!**

**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu parto: 12**

**Proponita labortempo: 40 minutoj**

---

Nova libro pri komisaro *Maigret* en Esperanto

Fine de aŭgusto Sezonoj (Kaliningrado, Ruslando) aperigis la libron „La flava hundo” de *Georges Simenon* en la traduko de *Daniel Luez*. Entute, oni eldonis pli ol 500 milionojn da ekzempleroj de Simenonaj verkoj en ĉirkaŭ kvardeko da lingvoj. En 1999 danke al *Daniel Luez*, al ĉi tiuj lingvoj finfine aldoniĝis ankaŭ Esperanto — per la romano „*Maigret hezitas*”, kiu estis verkita en 1968. La sukceso de ĉi tiu romano (la tuta stoko plene elĉerpiĝis ĝis la jaro 2002) instigis la tradukanton kaj Sezonojn aperigi pliajn librojn pri *Maigret* en la internacia lingvo.

En „*Maigret kaj la maljuna damo*” (1949), kies Esperanta traduko aperis en 2002, la komisaro forlasas Parizon kaj veturas al provinco por esplori komplikan kazon de servistino Roza, kiu supozeble mortis anstataŭ sia mastrino. Dum tridek kvin jaroj komisaro *Maigret* renkontis neniun el siaj samklasanoj, kaj jen al lia oficejo venis lia kunlerninto *Leono Florentin*, kiun la komisaro traktas profesie en „*Amiko el la junaĝo de Maigret*” (ĝi aperis france en 1968, Esperante en 2004).

„La flava hundo” estas unu el la plej fruaj romanoj pri *Maigret*. Ĝi estis eldonita en 1931, kaj jam sekvajare ĝia filmoversio kun *Abel Tarride* en la rolo de *Maigret*, estis spektebla sur ekranoj de kinejoj (aliaj filmaj versioj diverslingvaj aperis poste). La eventoj disvolviĝas en *Concarneau*, kie ĝis nun funkcias la restoracio Admiralo.

Kelkaj realaĵoj, menciitaj en la romano, eble ne estas facile kompreneblaj por nuntempuloj, precipe por nefrancoj. Ili estas asteriskitaj kaj klarigitaj en Notoj. Estas aldonita ankaŭ proksimuma prononco de kelkaj francaj nomoj, kiujn oni renkontas en la romano. La libro estas presita en *Kaunas* (Litovio). La kovrilon faris *Larisa Jakovleva*.

„La flava hundo” baldaŭ estos mendebla kontraŭ 12 eŭroj ĉe pluraj libroservoj, al kiuj la eldonejo jam sendis la librojn. En nia retejo estas



legeblaj la Antaŭparolo (de *Aleksander Korĵenkov*) kaj la unua ĉapitro.  
Agrablan legadon!

## 1. Elektu la ĝustan respondon!

1. a) *Daniel Luez* estas tradukinto de libroj pri *Simenon*.  
b) *Daniel Luez* tradukas librojn el la franca en Esperanton.  
c) *Daniel Luez* estas la aŭtoro de libroj pri *Maigret*.
2. a) La romano „*Maigret* hezitas” aperis en 500 milionoj da ekzempleroj.  
b) Oni tradukis ĝin al preskaŭ 14 lingvoj.  
c) Ĝi aperis en Esperanto 31 jarojn post la eldono de la originalo.
3. a) *Maigret* esploras la morton de Roza ekster Parizo.  
b) La maljuna damo nomiĝis Roza.  
c) La maljuna damo estis la servistino de *Maigret*.
4. a) La tria esperantlingva *Simenon*-verko estas „La flava hundo.”  
b) *Leono Florentin* estis samklasano de *Daniel Luez*.  
c) *Maigret* ne flegis siajn rilatojn kun malnovaj samlernejanaroj.
5. a) Surbaze de la romano „La flava hundo” oni faris la unuan filmon en 1933.  
b) „La flava hundo” estas inter la unuaj verkoj de *Simenon*.  
c) La esperantlingva traduko de „La flava hundo” estas legebla en interreto.
6. a) La kvara esperantigita *Maigret*-libro ankoraŭ estas aĉetebla.  
b) „La flava hundo” estis presita en Latvio.  
c) Sezonoj estas eldonejo en Rusio.
7. a) La esperantlingva teksto estas malfacile komprenebla pro tajperaroj.  
b) La francajn nomojn en la teksto oni prononcu fonetike.  
c) En la Notoj troveblas la klarigoj de malfacilaj esprimoj, francaĵoj.

## 2. Kompletigu la frazojn per la ĝusta cifero!

2 aŭ 3            5            35            37            53

1. Pasis \_\_\_\_ jaroj ĝis *Maigret* revidis sian malnovan amikon.
2. Pasis \_\_\_\_ jaroj ĝis elĉerpiĝis la unua eldono de la unua esperantigita *Simenon*-romano.
3. Pasis \_\_\_\_\_ jaroj inter la franclingva kaj esperantlingva eldono de la dua esperantigita romano.
4. Pasis \_\_\_\_ jaroj inter la originala eldono de la unue kaj la ĵus tradukitaj *Simenon*-libroj.
5. Pasis \_\_\_\_ jaroj inter la eldono de la unue kaj trie esperantigitaj *Simenon*-romanoj.

### IV/B

**Legu la suban tekston kaj solvu la taskon!**

**Maksimumo de akireblaj poentoj en tiu parto: 8**

**Proponita labortempo: 20 minutoj**

---

Falsaj eŭroj damaĝas ekonomion

La litova polico prezentis al Eŭropa Centra Banko konkretajn proponojn \_\_\_\_ (1). Tia ideo naskiĝis, post kiam la polico malkovris kontraŭleĝan presejon kun preskaŭ naŭ milionoj da altkvalite produktitaj centeŭraj biletoj. Unua informo \_\_\_\_ (2) atingis la polican departementon de Litovio antaŭ unu jaro, kiam estis arestitaj du junuloj, kiuj al ŝajnaj aĉetantoj vendis 1600 falsitajn eŭrojn. Tiam policistoj ne sukcesis eltrovi, kie estis produktitaj la monbiletoj. Ili pensis \_\_\_\_ (3). Nun oni supozas, ke la falsa mono ekestis en la presejo, kiun la polico en novembro 2004 malkovris en la urbo *Kaunas*. En la eŭrofalsado partoprenis du presejoj. Unu preparis kliŝojn, la alia presis. Ambaŭ oficiale okupiĝis \_\_\_\_ (4). Ili falsis nur centeŭrajn monbiletojn. La biletoj estas tiom altkvalitaj, ke malfacilas ilin distingi de aŭtentaj monbiletoj. La polico arestis 11 personojn, suspektatajn \_\_\_\_ (5). La arestitoj asertis, ke sian presagadon ili komencis en julio 2003. Pro tiu krimo la leĝaro de Litovio antaŭvidas enprizonigan punon de tri ĝis dek jaroj.

Onidire la presejo ricevis 3000 verajn eŭrojn \_\_\_\_ (6). Supozeblas, ke falsistoj sukcesis vendi minimume 8 milionojn da eŭroj. La lastan printempon krimuloj provis vendi 100 000 falsajn eŭrojn kontraŭ 40 000 veraj eŭroj al litovaj policianoj, ŝajnaj aĉetantoj. Pli ol unujara observado de krimagoj kondukis la litovan policon al sukcesa rezulto.

Estro de moderna presejo ekdubis, ĉu vere la eŭroj falsitaj en *Kaunas* estas tiom altkvalitaj, kiel supozas la polico. Ja por fari ilin tiel altkvalite, necesas havi specialan, \_\_\_\_ (7), kiuj estas strikte kontrolataj. Sed se evidentiĝos, ke estas tiel, kiel la polico suspektas, certe temos \_\_\_\_ (8), kiu kontribuis al akiro de originalaj eŭro-modeloj kaj al produktado de kliŝoj.

(laŭ *Monato* 2004/12)

**Enmetu la mankantajn frazpartojn en la ĝustan lokon  
(indiku en la tabelo la literkodojn)!**

- a) pri ligoj kun kunuloj en Hispanio kaj Francio
- b) por protekto de eŭro-monbiletoj kontraŭ falsado
- c) pri kontaktoj kun la internacia mafio
- d) pri eldonado de diversaj reklamiloj kaj revuoj
- e) por monfarado dediĉitan farbon kaj paperon
- f) pri partopreno en kontraŭleĝa agado
- g) pro la produktado de ĉiuj 5000 centeŭraj monbiletoj
- h) pri la moderna falsejo de eŭrobiletoj

1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.